Paul Gerhardt,

# Translasu ĉion, kio

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Translasu ĉion, kio
Vin premas en la kor'
Al nia kara Dio,
Foriĝos la dolor'.
La patro, kiu movas
La nubojn super ni,
Li certe vojon trovas,
Sur kiu iros vi.

2. Al Dio vi nur fidu,
Kaj bone fartos vi ;
Sur Lian verkon vidu,
Miriga estas ĝi.
Vi ne devigos Dion,
Eĉ se vi streĉas vin;
Atingos vi nenion,
Se vi ne petas Lin.

3. Ho patro, kio bonas
Por nia hom-natur',
Vi certe tion konas,
Ni kredu tion nur.
Kaj kiun Vi elektas,
Kreskigas Vi fortul',
Kaj tiun Vi protektas,
Ho saĝa Eternul'.

4. Ne mankas al vi vojo,
Kaj ne la rimedar' ;
Ja estas por ni ĝojo
Kaj beno Via far'.
Labor' kaj verko Via
Tre gravas ja por ni ;
Ho kara patro nia,
Ne devas halti ĝi.

. . .

5. Kaj kvankam kontraŭstaras
Diabloj tie ĉi,
Sendube Dio faras
Nur kiel volas Li.
Jes, kion Li planadas
Kaj kion volas Li,
Finfine ja venadas
Alcele tio ĉi.

6. Esperu, ho animo,
Ne malesperu vi,
Restadu vi sen timo,
Gvidadas vin ja Di'.
Se vin malbon' insidos,
Ne iru de la voj',
Vi certe iam vidos
La sunon de la ĝoj'.

7. Nun bonan nokton diru
Al zorgo kaj dolor'!
Ĝin lasu, ĝi foriru
Por ĉiam el la kor'!
Vi ne konduki ĉion,
Ne zorgu por la bon'!
Vi lasu regi Dion.
Li sidas sur la tron'.

8. Lin, Lin nur lasu fari!
Li estas saĝa reg'.
Vi devas mire stari
Adore kaj en preĝ'.
Ĉar Li laŭ Sia deco
Ĝin gvidos al la fin',
Kaj la kor-premiteco
Lasinta estos vin.

9. Li eble atendigos
Dum kelka tempa vin,
Kaj eble Li ŝajnigos
Indiferenta Sin.
Kaj ŝajnos, kvazaŭ volos
Li ne plu savi vin,
Neniam vin konsolos,
Retiros de vi Sin.

. . .

10. Sed se fidele restos
Vi al la patra Di',
Savita de Li estos
Neatendite vi.
Se malgraŭ senkulpeco
Suferi devas vi,
De l' peza ŝarĝiteco
Vin liberigos Li.

11. Ho ĝoju, fidelulo!
Donita de l' Sinjor'
Ja estas al piulo,
Al vi la venka glor'.
Folion de la palmo
Mem donos Li al vi;
Vi kantos laŭ la psalmo,
Dankante nur al Li.

12. Ho, lasu esti fino
De nia mizereg',
En via patra sino,
Eĉ malgraŭ sufereg',
Restadas ni surtere
Kaj post la vivo-fin'
Ĉe Vi ni estos vere;
Vi ja akceptos nin.

*Traduko de la Germana poemo "Befiehl du deine Wege" de* Paul Gerhardt *(∗1607-03-12 – †1676-05-27) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-546-1098 (2010-07-03 14:37:37)*

*La unuan, la duan kaj la kvinan strofojn mi, Manfred Retzlaff, korektis lau konsiloj de s-ro pastro Albrecht Kronenberger [Albrecht.Kronenberger@t-online.de].*